Hermann Löns,

Lüneburga erikejo

tradukita de Oskar Breddermann

1. Lüneburgan erikejon
en mirige bela land'
mi trapasis ĉiuloken,
multon montris voja rand'
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Fratoj, lasu glasojn tinti;
ĉar la muskatela vin'
acidiĝus pro maluzo,
tial ne eltrinku ĝin.
Faleri, falera
ho: karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

3. Ruĝajn cervojn ni ekĉasu
gaje en arbaro, dum
niaj hundoj laŭte bojas
kaj pafiloj krakas "bum".
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

4. Vi belega, vi ĉarmega
kvazaŭ lakt' kaj sango, flor';
ni anime kunligiĝu
kaj nin amu kor' al kor'.
Faleri, falera
ho; karul', karulin',
via ja scias, scias ja.

Traduko de la Germana poemo "Auf der Lüneburger Heide" de HERMANN LÖNS *(∗1866-08-29 – †1914-09-26) en Esperanton de Oskar Breddermann.*

Arg-624-1262 (2012-10-23 21:11:11)

Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la kantlibreto "Jen la kanto de l' vojaĝ"', eldonita de Dansk Esperanto-Forlag en la jaro 1973, represita de D.E.F. (Dana Esperanto-Federacio).